

Protokolo de la 42a senatkunsido (36a post la oficialigo de AIS fare de la Konsilio de XII, 45a post la fakta eklaboro) okazinta dum la 22a SUS en la ĉambro SM2 [Společenské Místnost] de la Pedagogia Fakultato de la Pedagogia Altlernejo en Hradec Kralové (CZ). Kunsidhoroj: sabato, 2000-06-10, 19:30 – 21:00, dimanĉo, 2000-06-11, 19:25 – 20:05.

Ĉeestantoj: Fössmeier, Frank, Holdgrün, Lewoc, Maitzen, Minnaja.

Aparta tagordo ne ekzistas.

Kolegoj Frank kaj Minnaja alterne gvidas la kunsidon.

Montriĝas, ke la senato unuanime apogas la daŭrigadon de la Akademio, kaj ke SUSoj estos ankaŭ estonte nepre bezonataj.

Ekzistas kelkaj diskutindaj punktoj, kie la strategio de AIS estas reviziebla: Ĉu AIS

- a) eduku eliton aŭ ĉu ĝi estu universitato por la amaso?
- b) mem „bredu“ ILo-parolantojn aŭ ĉu ĝi varbu anojn de la Esperanto-movado?
- c) eduku docentojn kaj profesorojn aŭ ĉu ĝi varbu esperantistojn, kiuj jam estas profesoroj?
- d) prefere agu kiel klasika (okcidenta) akademio aŭ prefere kiel universitato?
- e) laboru nur surloke aŭ alternative pli kaj pli uzu la komputilan reton?

La entuziasmo de la kunlaborantoj dum la pasinteco ne estis ĉiam la sama. Ni strebu atingi denove la etoson, kiu regis dum la komenco de la 90aj jaroj de nia jarcento, kiam malgraŭ ne optimumaj kondiĉoj (en Borgo Maggiore) AIS vigle laboris.

Decidoj pri la estroj de la unuopaj senataj oficoj: Okazas unuanima alvoko de kolegino Lewoc al la senato. Ŝi i.a. rolu plu kiel Senata Sekretario.

La senato konfirmas la jenan taskodistribucion por la jenaj senataj oficoj:

Fössmeier: informofico

Frank: prezidanto, identecofico

Lewoc: protokolo kaj publikigado

Maitzen: honoradofico

Minnaja: vicprezidanto, strukturofico, ekzamenofico

Pennacchietti: scienca esplorado

Wickström: trezoristo

Kolego Quednau jam antaŭe montris pretecon plu

gvidi la klerigoficon.

Krome, okazas jam surloke la jenaj decidoj pri pliaj taskoj transprenitaj de senatanoj: Holdgrün estu vicdirektoro de la ofico pri protokolo kaj publikigado, Fössmeier estu membro de tiu ofico, precipe pri protokolo, Lewoc restu asistanto de la ekzamenofico.

Aliaj elektoj por kompletigo de la oficoj okazu poste, laŭ la decidoj de la respondecaj senatanoj.

La temo de la surloka forumo estu: „Kurskorekto 2000: Kiel AIS progresu pli bone?“.

Pri la studadsesio en Israelo dum la UK 2000: se neniu el la ProtO povos partopreni ĝin, tiam PDoc. Barandowska-Frank pretas tie transpreni administrajn taskojn. Tria kursestro tie (krom OProf. Tonkin kaj PDoc. Barandowska-Frank) estu OProf. Wandel, se la cirkonstancoj estos favoraj (salono ktp.). Alikaze ni apliku la modelon, laŭ kiu la IKU-prelegaro konsistigas la 3an kurson (kiel prelegserion). Kolego Maitzen transprenas la taskon informi PDoc. Eichhorn pri tiu decido bonvenigante lian prelegon en la kadro de AIS/IKU kaj petante, se pro organizaj kialoj ne povos okazi la 3a kurso, ke li transprenu la kunordigestrecon de la prelegserio.

En la jaroj 2000 kaj 2001 okazu almenaŭ po unu SUS en septembro.

Kolego Minnaja proponas, ke li kontaktu eksterajn taŭgajn katedrestrojn por ekscii, ĉu ili pretas kunlabori en AIS, kion la senato bonvenigas.

La senato emfazas, ke AIS konservu la kontakton al San-Marino. Advokato Busignani ellaboru statuton laŭ niaj proponoj konsiderante, ke estu 12 t.n. „*promotori*“ („*soci*“) (parte ankoraŭ trovendaj), kiuj respondecu antaŭ la tribunalo en San-Marino, kaj la scienca parto de AIS estu delegita al la sciencistoj. Kolego Minnaja plu flegu la kontaktojn kun San-Marino kaj serĉu la personojn. La prezidanto proponas, ke la Akademio havu itallingve la nomon „... *di San Marino*“, en ILo restu la nomo „Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino“ (sen ,de‘ antaŭ „San Marino“).

Grave estas, ke AIS ne nur ebligu studadon, sed ankaŭ povu disdoni diplomojn, por kio necesas ellabori studadplanojn. La senato konstatas, ke ekzistas ĝenerala studadplano nur en la 1a sekcio. La 6a sekcio momente prilaboradas la sian.

2000-06-28 Prot: Fössmeier, Holdgrün, Lewoc